1-a Jaro, N-o 43

APERAS S.A.T. SEMAJNE

23. Julio 1925

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Redaktoro: N. BARTHELMESS
Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz

Gvidanto: Ekzekutiva Komisiono de SAT
23, rue Boyer, Paris XX

Administranto: R. LERCHNER
Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz

La paca movado

Angla libera komerco. — Amerikaj financistoj. — Ĉinia enirado. — Ĉu milito, ĉu paco?

Antaŭ pli ol cent jaroj okazis militbarakto de Anglio kontraŭ Francio. Tiam la homoj timis la nomon Napoleono, same kiel hodiaŭ bruis la nomo Lenin. Estis volvita mistera aŭreolo ĉirkaŭ ambaŭ iliaj nomoj, kiu timigis la simplulojn de ĉiuj landoj. Tiutempe en Anglio la komerca interŝanĝo estis malhelpata pro tarif-impostoj sur ĉiu varo, ĉu importita ĉu eksportita. Dum kaj post la Napoleona milito, la tekniko en Anglio rapidege pliboniĝis. Rezulte la interŝanĝo kaj eksporto de varoj, precipe kotonaĵoj, plimultiĝis.

Sed ĉar tio ne facile efektiviĝis, la koton-komercistoj komencis agitadon por forigi la tarif-impostojn kaj ebligi la liberan interŝanĝon kaj disponon de siaj fabrikaĵoj. Post kelkjara agitado ili sukcesis pro siaj klopodoj, kaj Anglio estis la unua modelo de liber-komerca lando.

La Amerika kontinento, tiutempe, estis infaneto kompare al la angla industriiĝo. Sed nun ĝi estas altkreska komercanto. Usono estas pli riĉa ol estas la kontinento Eŭropo. Usono estas unuo, dum Eŭropo estas dividita en multaj nacioj, kiuj daŭre armiĝas por interfrata militiro. Pli kaj pli, la usonaj komercistoj evoluigas Usonon al eksporta lando kaj trovas, ke la aliaj partoj de la mondo vivas malpace interĝenante. Por fari taŭgan interrilaton kun la komercistoj de Eŭropo kaj aliaj landoj, estas pli utile havi prosperan kaj riĉan eventualan aĉetonton, ol unu kiu estas malriĉa kaj malprosperas. Pro tio ĝiaj financistoj rekomendas nun la repacigon de Eŭropo, por senarmigi la multnombrajn ŝtatetojn.

Por akiri aĉetpovon aŭ krediton, la ŝtatetoj devas iri al tiu, kiu ĝin havas, al la riĉulo, do al Usonaj financistoj. Antaŭ ol pruntedoni la krediton al la malriĉaj nacioj, la Usonanoj faras siajn postulojn, por ke ili povu reakiri la saman valoron al si. Do ili postulas, ke la ŝtatetoj bilancu la buĝeton kaj malgrandigu sian soldataron. Se ili rifuzas — ĝi tiam povas respondi: "Vi ne ricevos iom ajn plu da mono de ni." Kiam tio okazas, tiam la valuto malboniĝas, la prezoj altiĝas, la popoloj ekgrumblas, ministraroj eksiĝas, kaj la stabileco de la lando ekŝanceliĝas. Se tio daŭras, tiam estas danĝero, ke la popoloj ne pace eltenos sian suferadon, kaj evidentiĝos signoj de ribelemo.

Usono deziras komerci kun Eŭropo, kaj estas profite por ĝi, ke Eŭropo estu restabiligita. Ĉar ĝi havas disponebla ĉiam fluantan riveron de surplusa kapitalo por investi, ĝi deziras ke la aliaj nacioj pace vivu por ke ĝiaj investaĵoj estu sekuraj.

Pro tio ĝi favoras la Dawes-planon de rekonstruo. Ĝi favoras senarmiligon, ĝi emas pli kaj pli al libera komerco kaj kontraŭ protektaj tarifoj.

Ĉinio prezentiĝas vasta lando, kiel loko, kiu povus facile sorbi la surplus-kapitalon de la povoj financaj. Pro tio oni unue penas havi diplomatian kaj militan superecon super ĝi, por garantii ke la riĉaĵoj ne malŝpariĝu.

Kvankam estas multaj faktoroj respondaj por allogi la riĉulojn tien, kiel malkara laborpovo de la indiĝenoj, sorbkapablo de la nova kapitalo, kaj ĝia strategia graveco en la Oriento, en la Pacifika Oceano kaj apud la Aŭstralia kolonio de Britio, iuj el tiuj faktoroj havas pli da graveco ol aliaj . . . Kaj nur estas eble per interdiskuto, atingi pli-malpli precizan ideon pri ilia graveco unu kompare al la alia.

Pro miaj studadoj mi emas konkludi, ke la ĉiama reprodukto de novaj profitoj akceptas la formon de potenca invest-kapitalo, kiu serĉas pri sorbemaj industrioj kaj landoj, kaj pro ĝiaj instigoj la diplomatoj kaj militistoj obeas kaj entreprenas la taskon, invadi fremdan teritorion por trudi sian estrecon super la senkulpajn kapojn de la trankvilaj indiĝenoj de Ĉinio.

Unue estri la *enirflankojn* de la landoj, kiuj tuŝas la oceanon: Poste la riĉuloj *enpenetros* iliajn riĉaĵojn trudante al ili siajn morojn, kredon kaj monopolon.

Tio estas la agadplano de la financistoj de Usono kaj Britio. La Brita Imperio pace interrilatiĝas. Ŝajne la financistoj al si proponos similan interrilaton inter la angle-parolantaj rasoj, t. e. inter Usono kaj la Brita Imperio. Post tio, estos pli da povo en iliaj kombinitaj manoj, kaj ili povos kune postuli siajn kondiĉojn de la malriĉaj nacietoj interfrate baraktemaj, ke ili paciĝu kaj refunkciigu siajn industriojn, por ke komerco denove floru.

Ni do havas du konfliktajn tendencojn elstarantajn de la moderna kapitalista epoko. Unu por komerc-interrilato — pacema, — la alia kun surplus-kapitalo sorbema deziras akiri novajn lokojn por ĝin investi — imperialismema. Nur la estonto povos determini, kiu tendenco fine venkos. Por ni laboristoj ekzistas nur unu sinteno. Se la kapitalistoj kaj financistoj ne povos pace refunkciigi la industriojn, sed malpaciĝas kaj militon deklaras, ni devas diri ke ni ne havas iun ajn kverelon kun niaj fratoj trans la maroj kaj landlimoj, kaj ke ni

tute rifuzas mortpafi niajn kunulojn de aliaj landoj. Se la riĉuloj nepre devas havi militon, lasu ilin mortpafi unu la alian, — tio estos bono por la mondo, estos malpli da parazitoj por suĉi nian ŝvitlaboron.

Ĉar la klaskonsciaj laboristoj ankoraŭ estas ne sufiĉe multnombraj, estas nia plej efika laboro adopti negativan sintenon. Rifuzu militiri! *3398, Londono*

Post la granda ĉina muro

V. Broŭn

La lastaj okazantaĵoj en Ĉinio pasas sub la signo de l' batalo, kiu disvolviĝas inter generalo Fin-Juj-Sjan kaj Manĝuria diktatoro Ĉjan-Czo-Lin.

"Kristana" generalo Fin-Juj-Sjan nur antaŭ 4—5 jaroj estis malmulte distingebla el inter vicoj de supera ĉina oficiraro. Liaj interligoj kun amerikaj misiistoj helpis al li antaŭeniĝi kaj atingi lian nunan situacion. La misiistoj konvinkis lin, ke li estas destinita por ludi la rolon de nova Oliver Kromvel dum ĉina civitana milito kaj por unuigi Ĉinion. Dank' al ilia laŭforta subteno li okupis gravan postenon en ĉjilia partio, kies ĉefoj estis Cao-Kun kaj U-Pej-Fu, kaj per kies helpo amerikana imperiismo batalis kontraŭ japanamika "anfuleta" partio, kiu plifortiĝis dum la militepoko. Fin-Juj-Sjan, dank' al sia decidemo kaj energio, ludis nemalgrandan rolon dum dispremo de l' armeo de Ĉjan-Czo-Lin antaŭ kelkaj jaroj; ankaŭ li sidigis sur prezidantan seĝon Li-Juan-Ĥun'on, por post kelka tempo okupi lian palacon per siaj soldatoj kaj devigi lin cedi la postenon por granda kapitalisto Cao-Kun.

Oni scias, ke dum sia prezidantesto Cao-Kun estis nur dekoraĵa persono, ĉar la ĉefa diktatoreca potenco estis koncentrigita en la manoj de general-gubernatoro de kelkaj centraj provincoj U-Pej-Fu, kiu rezidis en Lojano kaj sin apogis certagrade je bajonetoj de Fin-Juj-Sjan.

Estas interese, ke en ĉiuj siaj intrigoj kaj intervenoj al internaj aferoj de Ĉinio, fremdlandaj imperiistoj ordinare orientiĝas ne je unu certa persono, sed ludriskas samtempe je kelkaj. Dum la sama tempo, kiam amerika registaro kaj bankistoj estis subvenciantaj kaj subtenantaj U-Pej-Fu'on, iliaj lokaj agentoj, misiistoj, kiuj havas en Ĉinio treege potencan multebranĉan kaj multenombran laŭkonsiste organizaĵon, pretigadis novan homon — Fin-Juj-Sjan'on. Kiam inter U-Pej-Fu kaj Ĉjan-Czo-Lin komenciĝis milito, Fin-Juj-Sjan ne sen konsento kaj helpo de l' misiistoj aranĝis reĝimrompon en Pekino kaj faligis registaron de Cao-Kun. Karakteriza estas la fakto, ke la amerikanoj la unuaj opiniis ebla ne protesti kontraŭ la reĝimrompo kaj konsentis pri forigo de ilia baptito U-Pej-Fu, malgraŭ tio, ke li ankoraŭ penis batali transirante el provinco provincon kaj eĉ de sur militŝipo kaj teritorio de fremdulaj koncesioj ne ĉesigante gvidadon de l' kontraŭbatalo.

Post la reĝimrompo ekstaris plenkreske la problemo pri organizo de l' registaro. Por militistaj ĉinaj rondoj ĝi konsistas el la jeno: kiu el ili kaptos la potencon en siajn manojn. Fera diktatorado de U-Pej-Fu premis, ne lasante ekspiri, plimalfortajn generalojn tiagrade, ke multaj el ili eĉ ne revis pri nesubiĝo; la ceteraj unuiĝadis en la plej strangaj kombinaĵoj ligiĝante eĉ kun siaj plej kruelaj malamikoj por faligi lian potencon. U-Pej-Fu devis samtempe batali kontraŭ revolucia registaro de Komindan kun Sun-Jat-Sen enĉefe—sude, kaj kontraŭ ekstreme reakcia general-inspektisto de tri Manĝuriaj provincoj, nekronita reĝo de Manĝurio — Ĉjan-Czo-Lin, post kiu staris Japanio — norde.

Norde pli da bonŝancoj havis U-Pej-Fu, kaj, povas esti, ke sen perfido de Fin-Juj-Sjan, li sukcesus denove subigi sian malamikon. La "Kristana" generalo dum kriza momento helpis venki al manĝurianoj, sed li ankaŭ penis preni al si mem la potencon kaj ne transdoni aŭ dividi ĝin al Ĉjan-Czo-Lin.

Komence, post la venko la fortoj de l' ambaŭ kontraŭuloj estis proksimume egalaj kaj neniu el ili povis sin proklami prezidanto kaj koncentrigi la tutan potencon en siaj manoj. Tial sur la postenon de provizora prezidanto oni devis peti maljunegan marŝalon Duan-Ci-Ĝujon, la plej grandan militan aŭtoritatulon, sendisputan por pli junaj generacioj de ĉinaj profesiaj militistaj rondoj, kaj samtempe ĉefon de japanamika klubo Jan-Fu. La ĉefa propreco de l' maljuna marŝalo por la kontraŭuloj-generaloj, kiuj proponis al li la potencon, estis tio, ke Duan-Ci-Ĝuj havas nenian propran armeon kaj nenian realan bazon, je kiu li povus sin apogi, por elmontri sian volon al siaj elektintoj, sed ne esti obeema ludilo en iliaj manoj.

La unuaj promesoj de l' nova registaro pri kunvoko de "Nacia Konvento" por verki konstitucion kaj ĉesigi la senfinan civitanan militon, kiun daŭrigas la tro aŭtonomiaj dudzjunoj (general-gubernatoroj) kaj ilia arbitreco, kiu speciale montriĝas el tio, ke ili alpropigas ĉiujn regnajn profitojn, destinitajn por centra registaro, en siajn kasojn, — ĉi promesojn oni baldaŭ forgesis.

Anstataŭa larĝa reprezentado de ĉiuj tavoloj de l' loĝantaro, kiel tion postulis partio Komindan, Pekino kunvokis reprezentantojn nur de militistaj rondoj kaj de riĉaj klasoj. La antaŭmorta vojaĝo de Sun-Jat-Sen al Pekino, kiu montris komunajn kaj ĉiulokajn simpatiojn de ĉina civitanaro kaj de laboruloj al la gvidanto kaj ideoj de Komindan, tamen nenion trovis en decidoj de Pekina registaro. Dum kiam Komindan post morto de Sun-Jat-Sen travivas kelkajn internajn malfacilaĵojn, precipe apartiĝon de dekstrumaj elementoj, tuta Ĉinio, norden de rivero Jan-Cze, estas entirita al nova batalo inter Ĉjan-Czo-Lin kaj Fin-Juj-Sjan.

Manĝuria diktatoro iom post iom sukcesis aranĝi sian militistan kontrolon super Mukden-Pekina fervojo. Antaŭ nelonge lia filo deklaris je lia nomo, ke Ĉjan-Czo-Lin intencas "sendi ian parton de l' militistaro Pekinon al dispono de l' provizora prezidanto, kaj la restaĵo iros Manĝurion". Per tio Ĉjan-Czo-Lin formulas sian postulon, ke la nova registaro reale dependu de li. Per militprocedoj kaj lertaj manovroj li sukcesis fiksi sian influon, pli vere ekposedi kaj subigi al si kaj al siaj generaloj Nankinon, Tjan-Dzinon, Ŝanĥajon, provincon Czjan-Su. Oni kalkulas, ke Ĉjan-Czo-Lin disponas 200 000 bajonetojn, kaj Fin-Juj-Sjan — nur 100 000.

Post la reĝimrompo Fin-Ju-Sjan turnis tutan sian atenton al akiro de kontrolo super la fervojo Pekin-Ĥankoŭ kaj al fikso de siaj influo kaj potenco en gravaj komerc-industriaj kaj strategiaj centroj en la valo de rivero Jan-Cze, pro kio li devas kruele batali kontraŭ Ĉjan-Czo-Lin.

Por timigi Pekinan registaron, Fin-Juj-Sjan dum la tuta tempo tuŝas la demandon pri sia eksiĝo, sciante, ke ĝi kaŭzus malkontenton kaj ribelon de l' armeo kontraŭ la registaro. Li skribas leteron al sia iusa malamiko U-Pej-Fu, nomante lin frato kaj proponante kune foriĝi de l' aferoj por "eviti ĉiajn riproĉojn pri persona intereso". Lastatempe aperis la famo, ke Fin-Juj-Sjan penas proksimiĝi kaj ricevi subtenon de Komindan; li esprimas la opinion kontraŭ tio, ke en la landon venu fremdula kapitalo, sciante, kian grandegan sukceson en la masoj havas la lozungo pri batalo kontraŭ imperiismo. Ĉirkaŭ la batalo de l' du generaloj plektiĝas komplikegà nodo da fremdulaj intrigoj. Ĉi batalo ruinigas Ĉinion, malhelpas ĝian unuiĝon kaj progreson, sed la juna kapitalismo, rapide kreskante, enscenigas novajn potencajn kaj unuigitajn vicojn de proletariaro kaj aranĝas el ĝi la falangojn, antaŭ kiuj devos fali la mezepoka feŭdismo kun siaj militemaj inklinoj, same kiel kolonia imperiismo de kapitalistaj potencoj.

Elukrainigis el "Bilŝovik" N. 1323 Fedotov (728).

La parlamentelektoj en Nederlando

Dum la lastaj jaroj ni havis la bonŝancon esti regataj de Kristana registaro. Ĝi havis por solvi gravan problemon. Ĝi volis egaligi la en- kaj elspezojn de la ŝtato. Ĝi laboris por la "sekurigo" de la guldeno. Por tio ĝi havigis al ni novajn impostojn, ĝi malplibonigis la staton de la instruo, ĝi malplialtigis la salajrojn de la ŝtatoficistoj ktp. Kaj ĝi sukcesis! La guldeno nun ree valoras 100 cendojn. Sed la laboristoj iĝis la viktimoj de tiuj manipuloj. Pliaj impostoj, pli altaj prezoj, malpli altaj salajroj malsuprenigis ilian vivnivelon. Jen la sekvoj de la kristana reg-politiko. Sed ĉu ĉi ĉio ankaŭ ne estas sekvo de la malaktiveco kaj nebatalemo de la laboristoj mem?

Nun okazis novaj parlamentelektoj. La rezulto? La pozicio de la reganta koalicio (kristanoj kaj katolikoj) estis iom malplifortigita. Tamen ili havas ankoraŭ la plejmulton. Sed ĉu ili denove iĝos la regantaj partioj, montros la venontaj tagoj.

El la maldekstraj partioj plej forte kreskis la voĉ-nombro de la Social-Demokrata Laborista Partio. Antaŭe ili havis 20 lokojn, nun 24. La komunistoj, kiuj havis 2 lokojn, perdis unu. Tio ĉi estas tre verŝajne grandparte kaŭzata de la ĵus okazinta konflikto en la Kom. Partio pri taktiko. *670*

Teruro en Basarabio

26 famkonataj eŭropaj intelektuloj, parlamentaj deputitoj, profesoroj dissendis sekvantan manifeston:

„Al ĉiuj pacifistoj kaj filantropoj!

Jam delonge la rigardoj de l' civilizita Eŭropo direktiĝas al la okazintaĵoj en Basarabio — teritorio okupita de l' rumanoj. Sufiĉas citi la nombron de l' viktimoj de l' nova reĝimo, kielĝ in prezentas la gazeto "Caranismul" (vilaĝanarpartia rum. organo) de 18. dec. 1924.

Jen la datoj publikigitaj en tiu gazeto:

En la jaro 1918 estis senkapigitaj 3000 personoj;
dum 1919 11 000 personoj (inter ili 17 instruistoj);
dum 1920 80;
dum 1921 30;
dum 1922 55;
dum 1923 40, (inter kiuj 30 instruistoj);
dum 1924 1300;
dum 1925 laŭ informoj privataj 28. —
Entute 15533. —

Nuntempe komencos en Kiŝineu (Chisineu) granda proceso kun 300 akuzitoj: basarabiaj kamparanoj, infanoj, maljunuloj, knabinoj kaj maljunulinoj — atendas en la keloj de l' kiŝeneua karcero depost unu jaro, ke ili estu juĝitaj. Ili estas akuzitaj, ke ili ne volis transdoni al rumanoj siajn kampojn kaj ke ili rezistis al la trupoj de l' okupanta armeo.

Sen ke ni aprobu ilian proceson, ni protestas kontraŭ la maniero kiel ili estas traktataj.

En la rum. parlamento deputito Jakobesku deklaras oficiale je 13. majo de ĉi-jaro, ke ĝendarmoficiro Simĉeanu ordonis mortpafigon de 13 kamparanoj. (Vidu la oficialan gazeton "Monitorul Oficial" de 16 majo 1925).

Ne estas la unua fojo, ke la rigardoj de l' civilizita Eŭropo direktiĝas al la malĝojaj kaj barbaraj okazintaĵoj de Kiŝeneu. Jam antaŭ la milito la konscienco de Eŭropo leviĝis kontraŭ la cara reĝimo. Ankaŭ dum tiu epoko oni protestis kontraŭ la krueleca reĝimo.

Tiel ni ne povas resti indiferentaj, sed protestas energie kontraŭ la teruro basarabia, atestante samtempe ke la voĉo de l' humanismo vivas ankoraŭ en Eŭropo.

For la murdojn kaj mortpafigojn en Basarabio!"

En Kiŝineu, kie la malsato minacas ĉiam pli grave la popolon, post kelkaj tagoj okazos elekto parlamenta por la Senato. Organoj de l' registaro minacas la popolon per neplenumo de l' panhelpo promesita okaze ke ili voĉdonos por la opozicia kandidato.

En multaj urboj de Rumanio en la vendej-vitregoj estas ekspoziciita la portreto de l' mortigisto faŝista: studento Zelea Kodreanu inter portretoj de l' reĝino. — Tiu fama homo antaŭ nelonge mortpafis prefekton, kiu ne montriĝis tolerema kontraŭ la fiagadoj de l' faŝista studentgvidanto. Poste „juĝistaro" unuanime liberigis lin de sub la akuzo de hommortigo, montrinte en la motivaro, ke estis la kolektiva animo indignita de la popolo, kiu mortigis per la mano de l' studento la prefekton. — La fotografaĵoj montras lin kiel fianĉo en nacia kostumo kaj kiel li sidas antaŭ la juĝistaro. — *Neniu.*

Patriotismo de l' burĝo

Lasttempe internacia situacio de malgranda Estonio multe ŝanĝiĝis. Antaŭe kvazaŭ ignoretata de siaj pli grandpotencemaj najbaroj, ĝi, post "glora kaj energia defendo de civilizacio kontraŭ ruĝa danĝero" (en decembro pasinta) kiam la estonia "demokratio" sukcesis "silentigi" laboristan movadon, droniginte ĝin en torentoj de lab-ista sango, rikoltis admiron de l' tutmonda burĝaro kaj kiel ties *"persona grata"* (persono konsiderinda, favorato) akiris plenan samrajtecon ĉe aliaj randŝtatoj. Por demonstri plenan konkordon, regantan nun inter antaŭe iom rivalintaj Estonio kaj Latvio la prezidantoj interŝanĝis vizitojn. En majo sekvis vizito de finnlanda prezidanto, akceptita ankoraŭ pli pompe. Paradoj, festoj, bankedoj sekvis unu la alian. Kiom kostas ĉi kor-alianco" al ŝtata kaso, montras aldona buĝeto jus prezentita de l' registaro al la parlamento. Ĝi sumas 18 628 500 est. mk., destinitajn kovri la superelspezojn de l' ŝtatestro kaj tiujn de l' ministerio de justeco, devigita nutri pli grandan nombron de malliberigitoj ol estis antaŭvidite. Kvankam ĉiuj malliberejoj estas plen-plenaj ĉi tie, tamen estas dube ke la mizera nutrado de l' arestitoj kostas al registaro pli multe ol luksaj festenoj prezidantaj. Vane malmultaj voĉoj aŭdiĝis kontraŭ troa pompo, ridinda por malgranda lando; ili perdiĝis en patrioteca fanfaronado de l' gazetaro. Estas notinda fakto ke la domposedantoj, devigitaj ornami siajn domojn jen per latviaj, jen per finnlandaj flagoj, ankaŭ ekprotestis kaj deklaris ne plu partopreni en la flagornamado de l' urbo, se la registaro ne malvalidigos loĝejluan leĝon, iom bridantan apetitojn de l' domposedantoj. Por la burĝaro, predikanta al la popolo patriotismon kaj babilaĉanta pri "kara patrio", ne gravas ke lando estas baraktanta en malfacila ekonomia krizo, ke senlaboruloj senespere vagadas serĉante ajnan laboron — por la reganta klaso "supera politiko" kaj prestiĝo de l' ŝtato estas pli gravaj ol kreskanta mizero de laboruloj kondiĉe ke la elspezoj estas pagataj de la popolo sed ne de ili. Sed apenaŭ tiu prestiĝo ekrilatas ilian monujon, la burĝoj forgesas siajn predikojn kaj faras malkontentan mienon kaj "flagstrikas". *Nemo.*

Panem et circenses![1])

La mizerega stato de senlaboruloj en Polio. — La registaro pli malgrandigas la subvenciojn. — La registara buĝeto por senlaboruloj. — Proteststrikoj kun sangaj epizodoj.

En marto de k. j. la pola ministra konsilantaro eldonis disponon aprobitan poste de la sejmo (pola parlamento), kiu reduktas ĝis minimumo la ĝisnunajn malsatecajn subvenciojn por senlaboruloj per decido, ke en ĉiu familio nur unu persono rajtas ricevi laŭleĝan subvencion.[2])

La leĝo pri senlaboreco ne povis forigi eĉ en plej eta mezuro la mizeron kaj malbonsorton laboristan. Subvenciojn oni fiksis tiel ridinde etajn kaj la ricevado estas ĉirkaŭstarigita per tiom da malfacilaj kaj humiligantaj formalaĵoj, ke la prenado de ĉi-subvencioj estas efektiva turmentado kaj terura plilongigo de la agonio de senlaboraj mizeruloj.

Sed la registaro kune kun la sejmo opinias, ke la ĝisnunaj etaj subvencioj estas lukso por la senlaboruloj; la registaro decidis ke decas devigi senlaborulojn alporti novajn oferojn sur altaron de burĝa financa sanigo. Do la registaro decidis forpreni de duono da senlaboruloj ĉi malsatecajn, almozulajn subtenojn, kiujn ĝi ĝis nun tiel avare disdonis. La registaro ne hezitis fari tion en momento, kiam krizo plej bone furiozas, kiam kareco iĝis formale "fiksita" kaj benaspergita, kiam la pacienco kaj rezisteco de la mizerularo elĉerpiĝis.

Ĉi momenton de la ekstrema elĉerpo kaj mizero elektis la registaro por ŝpari kelkajn milionojn da zlotoj je kosto de laborista vivo kaj sano. Ĉi-momenton elektis la kapitalista "leviatano" (t. e. nomo de la pola kapitalista unuiĝo) por ke per manoj de registaro seniĝu la senlaboraj edzinoj kaj patrinoj de la etaj subvencioj.

Miloj da senlaborulinoj puŝitaj per unu plumstreko al fundo de la mizerego ne povis konsenti kun dispono forpreninta de ili la lastan panpeceton.

La plej grandaj demonstracioj okazis en Lódź (elp.: ludĵ; centro de la pola teksindustrio, 514 000 loĝ., 1145 fabrikoj), kie la senigitaj de la subvencioj senlaborulinoj ricevis belegajn promesojn de la vojevodo (provincestro); kiam la promesoj ne estis plenumitaj, la senlaborulinoj denove are protestis kaj tiam la polico "faris ordon"

---

[1]) Latine: "panon kaj cirkludojn!" — la postuloj de l' roma popolo (antikvatempe). — *Red.*

[2]) Gefraŭloj ricevas 9 zlot, edzigitaj 12 zlot, familiestroj 14 zlot posemajne, se ili laboris en la lasta entrepreno almenaŭ dum 13 sinsekvaj semajnoj. La subvencio daŭras dum 26 semajnoj.

en konata maniero. Oni vane atendadas la promesplenumon ĝis hodiaŭa tago.

La registaro faras ŝparaĵojn de la malsatantaj, lacigitaj laboruloj. Sed ĉu ĝi ne arigas kaj malŝparas monon por celoj favoraj al fabrikantoj kaj uzuristoj? La elspezoj de la financa ministrejo ja suprensaltis de 1 1/2 miliardoj (1924) ĝis 2,2 miliardoj da zlotoj (k. j.). En la daŭro de unu jaro la ŝtataj elspezoj kreskis je 50%! Nuraj elspezoj por la militistaro, polico kaj malliberejoj atingas pli ol 1 miliardon. Kaj kiom el tiaj sumegoj estas elspezataj por mildigo de la senlaboreco? Jen laŭ registara projekto ĉio kune 10 (legu: dek) milionoj, t. e. malpli ol 0,5% de la ŝtataj elspezoj. Nenio pli frapante nudigas ĉi ŝparkomedion. Nenio pli evidente pruvas al la laboristaro ke la nuna registaro same kiel ĉiuj antaŭaj estas kaj volas esti nur fervora efektiviganto de la kapitalista ekspluatado.

Alia momentbildo: La dudektrian de junio okazis en tuta Polio duhora proteststriko kontraŭ la senlaboreco. En Lwów (elp.: lvuo: Lemberg-Leopol, 220000 loĝ.) la strikintoj kunvenis en la korto de la magistrata domo. Post kelkaj alparoladoj delegitoj estis senditaj vojevodejon (t. e. provincestrejo) por deklari la postulojn de la laboristaro. Ankaŭ la strikintoj en nombro de kelkmiloj ekmarŝis tien por sciiĝi la respondon de vojevodo. Estas substrekinde, ke ili marŝis en plej bona ordo, trankvile, sen standardoj ktp., ĉar ili kunvenis rekte el la laborejoj. En malvasta alirstrato la marŝo estis haltigita de fortega polictaĉmento kun pafpretaj fuziloj: "Disen!" La malantaŭe marŝantoj nenion sciinte antaŭenpuŝis la antaŭirantojn, kiuj ne havinte eliron, vole-nevole kunpuŝiĝis kun la kapitalgardistaro tuj uzinta bajonetojn. La laboristaro defendis sin per ĵetado de karbpecoj el proksime starinta karbveturilo, disŝiris la pavimon kaj ĵetis per pavimŝtonoj. Ekatakis rajdanta polictaĉmento, kaj gaje falis la sabrobatoj sur kapojn de la mizerularo ĵus forlasinta la ekspluatejojn por modeste memorigi la grasan burĝaron, ke iliaj fratoj malrapide mortas pro malsato ne havante laboron. La stratbatalo daŭris ĉ. 2 horojn. La gazetaro skribis pri kelkdek vunditoj, ne doninte precizajn ciferojn. Kulpaj estas laŭ burĝa ĵurnalaro memkompreneble "bolŝevikaj" provokistoj. Tio estas pruvita, ĉar ili trovis ĉe arestitoj "bolŝevikajn" flugfoliojn. Ho, vi malbonaj bolŝevikoj, kial vi provokis la policon al uzado de bajonetoj kaj sabroj?! Eble vi eĉ subaĉetis la registaron, por ke ĝi malplenumu la donitan promeson, komenci grandskalan konstruad-kampanion por mildigi la senlaborecon? La "bolŝevikaj" flugfolioj havis titolon: Interpelacio de la deputitoj el komunista deputit-frakcio en afero de nova limigo de rajtoj por senlaboraj gelaboristoj, enhavis la supre mallongigitan tradukon kaj estis laŭleĝe subskribitaj: Eldonita de la deputito Vojtiuk, Warszawa, sejmo. — Memkompreneble ĉi-flugfolioj estas la plej bona pruvaĵo, ke la tuta okazintaĵo estis verko de "bolŝevikaj" provokistoj. — Ridu, bajaco! *Kortegano.*

La ĉevala danĝero

Sur Balkana duoninsulo la vivo politika estas simila je fortbruanta fonto, certe, se la politikan vivon kompreni speciale balkane. La politika vivo en la soveta lando — tio ĉi estas la sovetaj kaj partiaj kongresoj, konferencoj, diskutoj, tezoj, decidoj . . . La politika vivo en la Okcidenta Eŭropo — tio ĉi estas la parlamentaj babilaĉejoj, la senesperaj saltoj de partioj kaj kabinetoj de ministroj, la dancoj de fiŝoj de demokratio kaj post ĝiaj kulisoj — la despota regno de kapitalismo. Sur Balkano la politika vivo — tio estas mortigitoj, ektranĉitoj, mortpafitoj "dum intenco por forkuro", ministroj, deputatoj, makedoniaj gvidantoj aŭ kaptitaj komunistoj. Alivorte, tio ĉi estas la labortago de nuna Balkano. Sed tie estas festoj ankaŭ. Pri la sanga festo en Bulgario ni scias jam . . . En nájbara Jugoslavio la politika sensacio estas jam alia, pli senofenda. Jugoslavio estas premita, terorigita, surprizita kaj konfuzita . . . de sovetaj ĉevaloj. La danĝero enmoviĝis la sendefendan landon tiel neatendite kaj elemente, kvazaŭ el ĉielo. Alivorte venis la dia puno. Ĉu oni povas esti io pli simpla, ol ĉevalo? Ĉevalo, kiel ĉevalo. Sed, mirinde en malnobla ĉevalo estas politiko ankaŭ! La malĝoja historio pri la Trojana ĉevalo estas konata por ĉiuj. Sendube, la bolŝevikoj decidis ripeti la sperton de antikvaj grekoj. Videble, revolucio devus penetri Jugoslavion en internaĵo de ĉevaloj. Ekstere historio devenis kvazaŭ feliĉe. La soveta registaro ekaĉetis en Hungario grandan kvanton da ĉevaloj por SSSR. Ekaĉetita "ĉevala konsisto" devis sekvi trans Jugoslavio kaj Fiume en Odeson. De jugoslavia registaro oni ricevis la necesajn transportajn dokumentojn, por ke estu transportataj ĉevaloj. La unua transporto el 270 ĉevaloj feliĉe transiris la landlimon kaj alvenis jam en Rakek (urbo de Jugoslavio), kiam la rusaj blankuloj kaj simpatiantaj ilin serbiaj ronĝoj eksciis pri skuanta fakto. Doni la vizojn por bolŝevikaj, ruĝaj ĉevaloj? Ĉu ne estas tio ĉi la sama, kvazaŭ subhaki la lastan branĉon sub si? Tuta emigrantara Belgrado ekondiĝis kaj ekturnis sin. Oni povus preterlasi la blankajn ĉevalojn por estontaj generalaj enveturoj, tio ĉi estas sufiĉe bona, sed preterlasi la ruĝajn ĉevalojn! Ĝis kio ni ĝisvivis, ho, rusoj! Veturadis la lipharaj generaloj en veturiloj, krakadis la telefonoj kaj kunsidadis jugoslaviaj altranguloj. Venko! Bazante sin pri tio, ke la sovetaj ĉevaloj evidente (kial evidente?) estas antaŭmarkitaj por Ruĝa Armeo, ministerio de internaj aferoj malpermesis la transporton de ĉevaloj, kiel nepermesita, transportita materialo. "Nova tempo" kaj belgradaj dekstraj gazetoj presis laŭtajn notojn kaj artikolojn. Kial la fervoja estraro en Zagrebo permesis la transporton de sovetaj ĉevaloj? Kiel la jugoslavia konsulo en Budapeŝto kuraĝis doni la vizon por tiuj ĉi malnoblaj, komunistaj, ĉekistaj ĉevaloj? Estas necese esplori kaj urĝe! La esploro estis komencita. Ree krakadis la telefonoj, tordis siajn grizajn lipharojn la reŭmatismemaj generaloj: "Ni ne permesu! Ne preterlasu! Kia malbelo!" Monarĥia Belgrado estis triumfanta. Fari la venkon super 270 sovetaj ĉevaloj — ja tio ne estas la sama, kvazaŭ ŝafviro ternis. Ni militu ankoraŭ! Sed subite ekfrapis bato. Ofendo, malvenko, konfuzo. Hungaria registaro, por kiu estas interese vendi ĉevalojn al Soveta Unuiĝo, ekpostulis preterlasi la transporton de ĉevaloj trans Jugoslavion. Serbia diplomataro devis cedi. Kaj sovetaj ĉevaloj, malgraŭ malĝojo kaj ploro de "Nova tempo", faradas la vojaĝon trans reĝolando de Serbio, Ĥorvatio kaj Slovenio, kondukante per la oreloj kaj sonore frapante per la hufoj la plankon kaj la muretojn de vagonoj. Tremetu, jugoslavoj! Singardemu, la blankaj generaloj! Se por vi la fortikeco de ekzistanta reĝimo estas kara, ĉirkaŭigu la vojaĝantojn per triobla eskorto, sed nur ne ĉevala! Ja se eĉ unu el sovetaj ĉevaloj estos ekblekanta, tiam tuta ĉevalaro de Jugoslavio estos dispropagandanta sin kaj poste leviĝos. Ja en Rusio estas "bona rilato al ĉevaloj". Tradukis Ano (SAT n-o 3722) laŭ "Pravda" n-o 115

TRA LA KLASBATALO

La fama dekreto de l' ministro Bérard, kiu malpermesis instruadon de esperanto en francaj lernejoj, estas oficiale nuligita (certe dank' al la lastaj sukcesoj de esperanto en Parizo).

Tri el la sovet-aviadistoj ekflugintaj de Moskvo alvenis en Pekino (13. 7.).

En proceso kontraŭ 67 komunistaj "konspirantoj" la milittribunalo de Filipopel en Bulgario mortkondamnis 33 kamaradojn.

En tuta Germanio strikas la konstrulaboristoj. Nuntempe estas pli ol 120000 personoj.

La tielnomata "maldekstra bloko" en Francio estas fendita. La socialistoj apartiĝis.

Je la fino de la nuna monato, la dungantoj lokaŭtos la karbministojn de Anglio. 300000 el ili estas nun senlaboraj. Kaj dum normala periodo, 1200000 estas okupataj. Ili penas instigi aliajn sindikatojn iel helpi ilin. *F.*

Kongreso de Anglaj Satanoj okazos je fino de Aŭgusto. *F.*

La sindikatisto Amedée Bousquet, batalinto de la panista sindikato en Francio, lasttempe mortis en hospitalo. Li estis sep-dek jara. Dum sia vivo, li estis unu el la plej aktivaj batalantoj por la plibonigo de l' vivkondiĉoj de la panistoj. Pro sia revolucia agado, multfoje, li konatiĝis la malliberejon. Ĝis sia morto, li restis honesta kaj sincera kamarado. *659*

NIA DEVIZO:
ĈIU VARBU NOVAN ABONANTON!

DISKUTEJO

Pri la organiza temo

"Por kompreni, necesas ami", diris iu fama aŭtoro. Tion memorigis al mi la legado de l' artikolo [1]) de k-do Sproeck. Estas evidente, ke lia malnova, dekomenca malsimpatio por SAT malhelpas, ke li vidu ĝian veran figuron, ke li komprenu ĝian veran karakteron. K-do Sproeck vidas nur karikaturon, kiun kreis lia imago, kaj li prezentas ĝin dirante: kiom malbela, malsprita, maltaŭga, ridinda, ĉu ne?...

Blinda amo havas ankaŭ similan mankon. Ĝi emas vidi la amataĵon sub plej bela aspekto kaj sekve malatenti ties malperfektaĵojn. Necesas do rigardi per objektivaj okuloj kaj vidi ĉu la kritikoj de la *internacianoj* ĝenerale, kaj tiuj de k-do Sproeck aparte, estas ĝustaj kaj pravigeblaj.

Li diras: "*Ni konstatas la fakton, ke en la landoj ekzistas propagandaj asocioj, ke mankas la internacia kunfando de tiuj asocioj. Tamen ekzistas SAT. Sed ĝi ne estas nek volas esti la internacio de la laboristaj Esp. organizacioj*..."

Tio estas vera. Sed nia internaciano bedaŭrinde forgesis montri la necesecon kaj taŭgecon de tia "kunfando" de landasocioj. Unue mi rimarkigu, ke en la konstato de k-do Sproeck troviĝas tre atentinda eraro. Li ne devus diri: „en *LA* landoj ekzistas propagandaj asocioj", sed en *kelkaj* landoj. Sed eble tio ne gravas por lia tezo. Ja, sufiĉas la "kunfando" de du-tri landaj organizaĵoj por ke ekzistu *unu* internacio!...

SAT evidente ne volas esti ia internaciaĵo, tial ke tiu organizsistemo estas tute ne taŭga por mondlingvanoj. SAT volas esti aparato, celanta la praktikan utiligadon de esp-o sur tutmonda skalo. Ĉu ĝia strukturo ebligas tiun utiligadon pli bone aŭ plimalbone ol internacio el kelkaj landasocioj? Jen la demando kiun devus unue starigi kaj respondi la internacianoj. Sed por pravigi malpravan tezon ili sendube preferas konfuzon ol klarecon. Sufiĉas ja korekte prezenti al si la ĉeftemon de l' problemo por ke oni tuj ekvidu, ke la SAT-solvo estas pli taŭga ol tiu proponata de la internacianoj.

Anstataŭ liveri bonajn argumentojn, k-do Sproeck almenaŭ faris mirindan eltrovaĵon. Jen vidu: "*... la nuna socio kun siaj politikaj limoj ne lasas nei sin*..."

Nu, kiu diris la malon? Kial do perdi la tempon por pruvi la ekziston de io, kion neniu neas? Temas pruvi, ke la esperantistoj, kvankam ili estas samlingvanoj devas tamen imitaĉi la nesamlingvanojn en sia organizado por apliki esp-on sur tutmonda skalo. Sed vane vi serĉus en la skribaĵo de k-do Sproeck iun ajn argumenton kapablan pruvi tion.

Ni daŭrigu ekzameni la kritikojn de nia internaciano. Sennaciismo estas nur "bela teorio" moktone li diras. Unufojon pli, mi demandas: kiu diris la malon? Jes, bedaŭrinde, sennaciismo estas ankoraŭ nun je teoria stato. Sed la samon oni povas diri pri socialismo, komunismo, anarkismo. Kaj vi, k-doj, kiuj propagandas kaj provas kiel eble efektivigi tiujn ismojn ne supozas certe, ke laŭ la vere mirinda argumentmaniero de k-do Sproeck, tio "*signifas la konstruon de domo, komencata ĉe tegmento.*"

Sed SAT havas sektorojn. Ĉu estas io pli ridinda? Ĉu iam ajn la socio estos konstruita laŭ sektora maniero?

Kara internaciano, prefere sciigu al ni en kiu paragrafo de la SAT-statuto estas dirite, ke la estonta socio kopios certe la SAT-sektorojn. Vere, oni ne povas ne malaŭdi tian metodon de diskutado, konsistantan en disturno de faktoj, en misigo de intencoj, en sofistigo de ĉio.

Ni ja kredas, ke la estonta socio por vivi pace devos malatenti ĉian ajn *nacian* aŭtonomion, devos sekve funkcii laŭ sennacieca principo. Ni scias, ke la krudaj riĉaĵoj ne dispartiĝas laŭnacie; ni ne malatentas, ke la kapitalismo per siaj trustoj kaj monopoloj jam nun organizas la produktadon laŭ sennacieca maniero. Sekve, la ĝermo de sennacieco jam ekzistas en la faktoj. Do, valoras la principo, kaj se mondlingvanoj provas laŭ eble jam nun obei ĝin, ili pli bone ol aliuj scipovas sekvi la fluon, kiu portas la homaron al neevitebla unueco.

Sed kie oni do uzas la sektorojn, demandas k-do Sproeck. Kaj li mem mokrespondas: — "por elekti sektorestrojn." Jes, efektive, ili utilas nur por tio!... En la penso de la iniciatintoj de SAT ili ne havis alian rolon ol malhelpi, ke en la estraro de nia organizaĵo estu reprezentataj nacioj; ni volis, ke ĉe niaj kongresoj neniu povu paroli je la nomo de "sia" nacio, kiel okazas en ĉiuj internaciaj kongresoj. Neniun alian rolon ni difinis al la sektoroj. Se okazis, ekzemple, ke iu D. K.-ano sin konsideris kiel veran estron de "sia" sektoro kaj aldonis eĉ tiun titolon al sia subskribo, li per tio nur ridindigis sin, sed tute ne agis laŭ la ideo de la SAT-iniciatintoj.

Sed estus erare pensi, ke nia intenco instigi la SAT-anojn al kiel eble plej ofta ignorado de nacioj estas sensignifa laŭ eduka vidpunkto. Kiu do ne scias, ke en la laborista movado, *internacie* organizita, ofte naciaj konsideroj, naciaj frotoj, ludas gravan rolon, malhelpante veran unuecon de penso kaj agado? Tio estas neevitebla ĉe elementoj *nacie* grupiĝintaj kaj kutimantaj nur agadi nacie. Ili tute nature emas prikonsideri la problemojn je sia propra nacia vidpunkto. Kaj la samo okazus en ia internacio el esperantistoj. Ĉiu scias, aŭ almenaŭ devus scii, kiom granda estas la rolo, kiun ludas la medio, la kadro, la kutimo en la formado de nia menso. Nacia kadro neeviteble estigas naciistojn, eĉ ŝovinistojn. Sekve, se ni firme deziras, ke la sennacieca sento forte enplantiĝu en niaj koroj, ni ne devas malzorgi iun ajn okazon, iujn ajn rimedon por ignori la naciojn, por eliri el la nacia kadro, por kutimiĝi al eksternacia sentpens- kaj agadkapablo. Necesas insiste ripeti tion.

Nia samlingveco ebligas, ke en nia organizado por la *apliko* (mi ne diras por la propagando) de esp-o, ni ignoru la naciojn. Se tion ni ne farus, ni montrus filistran kaj rutineman spiritostaton tute ne indan je nia granda tasko, je nia nobla celo. Ni montrus, ke ni komprenas nenion pri edukado.

La sektoroj, kiel ili estas desegnitaj sur la mapo de la Jarlibro, havas nur simbolan valoron. Oni aliigu ilin je daŭbsistemo, je iu ajn alia maniero, krom la nacia, tio tute ne gravas.

Per sia kritiko, k-do Sproeck montris simple, ke li ne komprenas la edukvaloron de la mondlingvo. Tial, anstataŭ ridindigi la sektoran sistemon, li nur ridindigis sin mem, metante sin en la pozicion de kiuj provas ridindigi esperanton, kvankam ili ne penis por lerni kaj kompreni ĝin.

Jen eble pli serioza argumento, tial ke ĝi sin bazas sur fakto. Ni vidu. Por pruvi, ke la ideo de sennaciismo "elsekiĝis", k-do Sproeck notas, ke en S-lo. oni nur parolas pri "*vivo de la laboristoj en Anglio, pri strikoj en Norvegio, pri Germanio, pri Rusio.*"

Oni preskaŭ hontas esti devigata rebati tian "argumenton". Mi nur faru komparon. Jen aŭdu tiun kompatindan malsanulon, kiu senĉese parolas pri siaj doloroj kaj tutcitas la nomojn de siaj malsanoj. Doloras lia kapo, liaj piedoj, lia hepato, lia koro ktp. Kaj tamen li esperas resaniĝi; tiucele li streĉas la fortojn. Por li la sano ankaŭ estas tamen nur "bela teorio", tutcerte. Nu, karaj legantoj, kion vi opinius pri kiu mokus la kompatindulon? Vi certe pensus, ke la mokanto estas senhonta malafablulo, senkora cinikulo. Tamen k-do Sproeck ne timas sin meti en tute similan pozicion, kiam li riproĉas al nia gazeto, ke ĝi parolas senĉese pri nacioj.

Ĉu necesas insisti? Mi pensas, ke ne.

Mi daŭrigu serĉi, ĉu en la artikolo de nia internaciano ne troviĝas argumentoj pli diskutindaj: "*La praktiko ankaŭ montris, ke ne estas eble dispartigi la movadon laŭ 'por' — aŭ 'per' Esperanto.*"

Ĉu efektive la praktiko pravigas tiun aserton? Ni rigardu la realon, la vivon. Estas vere, ke ofte la samaj k-doj plenumas la por- kaj per-esperantan taskojn. Kion pruvas tiu fakto? Ĝi pruvas nur, ke tiuj propagandistoj estas agemaj kaj spertaj en la manipulado de la du aparatoj, sed ne, ke nur unu estas necesa.

Ĉu ne estas ankaŭ konstateble, ke en sindikatoj, kooperativoj, partioj kelkfoje estas ankaŭ la samaj fervoruloj, kiuj plenumas la diversajn taskojn? La konsekvenco, kiun tiras k-do Sproeck el la supre parolita fakto estas do tiel saĝa kiel jena propono, kiun mi faru laŭ lia speciala logiko: dispartigo de sindikata, kooperativa kaj partia laboroj ne estas ebla. Sekve necesas "kunfandi" la tri organizaĵojn en unu saman!...

1) Oni vidu la n-ron 42.

Sed jen ankoraŭ pli miriga aserto: "*La laboro peresperanta nuntempe nur havas etan (eĉ nulan) valoron peresperantan.*" Leginte tiun frazon mi eksaltis kaj demandis min kiel estas eble, ke inteligenta homo povas skribi tian plej evidentan sensencaĵon? Kompreneble ne decas refuti tian paradoksegaĵon. Sufiĉu noti unu fojon pli, ke nur la dekomenca malsimpatio de k-do Sproeck por SAT malebligas, ke li povu paroli pri ĝi kun ia plej elementa saĝo.

La posta frazo, kontraste je la antaŭa, estas almenaŭ tute vera. K-do Sproeck diras: "*La laboro peresperanta valoras poresperante, por la propagando.*"

Evidentege! Kaj en tio kuŝas la merito de SAT. Multaj k-doj povas aserti, ke la sperto montras, ke la provo de tuja aplikado de es-po sukcesis forviŝi ĉe kelkaj rondoj la malsimpation, kiun ili havis pri la mondlingva movado. Kaj oni jam povas antaŭvidi la tempon, kiam plu ne estos bezonataj poresperantaj aparatoj (landasocioj, aŭ "propagando-fakoj", laŭplaĉe) — dum aparato por apliko de la lingvo (SAT) restos ankoraŭ longe necesa.

Mi ekzamenis la plej ĉefajn riproĉojn, kiujn la internacianoj direktas kontraŭ SAT. Certe ne estas necese daŭrigi la refutadon de ĉiuj aliaj senbazaj kritikoj, kiuj svarmas en la artikolo de k-do Sproeck. La legantoj povas mem per atenta legado kaj serioza pripensado ekvidi, ke li disturnas la faktojn, kripligas la intencojn kaj sekve tute ne argumentas objektive. Lia malsimpatio igas lin miopa kaj nekomprenema.

Sed kial do ekzistas ĉe k-do Sproeck kaj kelkaj aliaj k-doj malsimpatio por SAT? demandos sendube la legantoj. Tion mi klarigos en sekvanta artikolo. *E. Lanty.*

Unua Internacia Laborista Olimpio.

Je la 24.—28. julio ĉi-jare okazos en Frankfurt apud Main la Unua Olimpio Laborista. Antaŭ tiu ĉi aranĝo jam okazis kelkaj asociaj festoj de diversaj organizaĵoj, kiuj ankaŭ havis internacian karakteron, pro eksterordinare multnombra partopreno de fremdlandaj asocioj. Estu rememorigate pri la laboristaj sportfestoj en Praha, Leipzig, Zürich kaj Karlsbad. La plenumo de tiuj ĉi festoj kaj la solidara interkompreno de la kamaradoj kaŭzis la ideon pri Unua Olimpio Laborista. La oficejo de Lucerna Sportintern per ĉi-Olimpio Frankfurta okazigos revuon super la masoj, kiel ankaŭ super la teknika kapablo de la asocioj aliĝintaj al ĝi. La ekonomiaj cirkonstancoj, kiuj en ĉiuj landoj influas la vivon de la laboristoj, ne estas tro rozkoloraj kaj ankaŭ tute ne kuraĝigaj por la partopreno de individuoj al tiu ĉi granda aranĝo, sed tute ne allogaj por la gastoj el malbonvalutaj landoj. Tamen la Olimpio superos ĉiujn ĝisnunajn aranĝojn kaj aŭskultigos multajn rigardantojn pro la tondropaŝoj de la laboristsportuloj.

En pli ol unu rilato la Olimpio estas atentinda por la laboristaro. La sportejo, en kiu okazos la aranĝo, estas konstruita de la magistrato Frankfurta. Antaŭ la milito sur tiu ĉi loko staris la pafejo de la garnizono Frankfurta. Post la revolucio la tuta areno rekonstruiĝis, kaj komence de junio ĉi-jare transdoniĝis al la publiko en nova vestaĵo. Ti-kie iam homoj ekzercadis, por lerni la pafadon por hombuĉado, nun estiĝis bonega ejo, kiu nepre meritas specialan atenton.

La tuta stadiono estas ĉirkaŭata de arbaro ampleksanta 34000 hektarojn (unu hektaro 10000 kvm). La stadiono ampleksas 39,5 hektarojn da areo en kiu troviĝas la konkurejo, la ludareno, ciklosportejo, la naĝujo, kaj lum- kaj aerbanejo kun ĉiuj necesaj kontoroj, ejoj por konkurjuĝantoj, sanitaristoj, alivestejoj kaj administraj ĉambroj. Per arboj kaj ĝardenaĵoj la unuopaj konkurejoj dispartiĝas, kaj bonege konstruitaj tribunoj havigas sid-kaj starlokojn, por pli ol 150000 personoj.

Ĉi-areno simbolas la renverson de la militarismo en sencoriĉa formo. Sur la ruinoj de la iama militista pafejo leviĝas la nova stadiono kaj ebligas al la laboristaro okazigi sian unuan olimpion.

Simbole ankaŭ impresas la projektita, por ĉi Olimpio afiŝo rilate al tiu ĉi stadiono, ankaŭ sur ĝi sportulo kun ruĝa standardo paŝas trans rompita militilaro kaj armiloj.

Al tiu ĉi Olimpio la laborist-sportuloj almarŝos kun la ruĝa standardo de la laboristaro. Ili ne laŭdos la konkurojn kiel nacian agon, kaj ankaŭ ne batalos por la venko de sia nacio, sed ili konkuros kontraŭ samideanoj, kontraŭ fratoj.

La faroj de la individuo ne estos vidataj en nacia prijuĝo kaj efiko, sed ili estos taksataj en la spegulo de popolforto kaj popolsaneco. La faroj de la individuoj kaj ankaŭ la prezentoj de la masoj estu la forta leviĝo de la pro laboro kurbigitaj dorsoj kaj de la al lumo kaj suno celantaj laboristaj masoj. La ekzercoj devas evidentigi, ke ili ne estas memcelo, sed ke ili ĉe la praktikantoj vekos memkonscion, kuraĝon kaj decidemon, kiujn ili en la batalo pro la vivo, pro la konservo kaj plibonigo de la ekonomia kaj politika situacio, bezonas ĉiutage.

La Olimpio devas servi al popol-interfratiĝo kaj interkompreniĝo, kaj la partoprenintoj al ĝi resonigos tra ĉiuj landoj:
Liberaj homoj ĉirkaŭu nin, luktantaj kun ni ĝis bona fin', sed ne — sur sanga kamp' de batal'.

C. Gellert
Prezidanto de la Germana Laborista Gimnast- kaj Sport-Asocio.

Kongresanoj

kapablaj paroli en publikaj mitingoj, sin anoncu tuj skribe al la kongreskomitato.

SAT-anoj! Laboristoj!

La komitato de la V. SAT-Kongreso preparas grandan ekspozicion por la kongresa tempo.
Ĉiu terangulo devas esti reprezentata!
Ĉiu k-do devas nepre kunhelpi!
Sendu tuj materialon, la afero urĝas!

Inter ni

Mi ricevis jenan leteron:

"*Kara Iuelie,*

"*Vi diris, ke en SAT estas malmulte da konsciaj sennaciuloj; ke la plejmulto metas en la vorton* sennaciismo *nuran sencon de internaciismo. Eble, sed anstataŭ moktone riproĉeti, prefere vi klarigu la diferencon inter la du ismoj...*"

Iuelĉie.

Pravas certe tiu k-do. Ni ja devas pli ofte ol ĝis nun klarigi en la organoj de SAT la signifon kaj veran karakteron de nia celo. Sed oni almenaŭ bonvolu prezenti al si la malfacilecon de la tasko.

Ĉu hodiaŭ estas eble skizi, eĉ nur larĝtrajte, la bildon de tutmonda mastrumado, funkcianta laŭ sennaciisma principo? Tion provante oni sendube trafus en la manion de utopiistoj kiel Cabet, Thomas Morus k. a. kiuj planis sociordon laŭ siaj pli malpli subjektivaj konceptoj. Ni eĉ ne kapablas priskribi tute precize la morgaŭan funkciadon de l' socio, malpli do la postmorgaŭan.

Sed eble ne necesas doktrinan pritraktadon por ekvidigi ideologian diferencon inter ambaŭ ismoj. Mi provu per cito de kelkaj konkretaj ekzemploj.

Kiu vidas en esperanto nur helpan *lingvon, nenial detruonta la naciajn, tiu estas internaciisto.*

Kiu opinias la malon, tiu estas sennaciisto.

Kiu celas la nuran kuniĝon de aŭtonomiaj *nacioj en iun internacion, tiu estas internaciisto.*

Kiu antaŭvidas kaj provas akceli mondmastrumadon en kiu ĉiu ajn nacia aŭtonomio estos ignorata, tiu estas sennaciisto.

Kiu ĉagrenas pri la malvenko de sia nacio, kvankam li ne deziras ion malbonan por la venkinta, tiu estas internaciisto.

Kiu male pretas batali kontraŭ sia propra nacio, se li opinias ke ĝi ne reprezentas la plej efikan faktoron en la historia proceso, tiu estas sennaciisto.

Kiu asertas, kiel Jan Jores, ke malforta internaciisma sento malproksimigas de la patrio, dum forta proksimigas al ĝi, tiu estas internaciisto.

Kiu asertas, kiel Karl Marks, ke la proletaro ne havas patrion, tiu estas sennaciisto.

Amen!... Iuelie

Sukceso de protestoj en afero Crouch-Trumbull!

Ni sciiĝas el Usono, ke post reesploro en Honolulu pri la afero Crouch — sekve de pluraj protestoj de diversaj societoj al Washington — oni mallongigis la juĝojn de Paul Crouch de 40 ĝis 3 jaroj kaj de Trumbull de 26 ĝis 1 jaro. Reesploro farita de Maj. Gen. Wm. R. Smith de Honolulu. Oni poste sendis la aferon al juĝist-advokato Gen. A. Hull, Washington, (kiu eble plu esploros).

V. Kongreso de SAT

Wien, 11.—15. aŭgusto 1925

Gravaj sciigoj por la kongresanoj

Prezoj de fervojaj biletoj al Wien de

A) **Limstacioj:**

1 aŭstra ŝilingo = 10000 paperaj kronoj
1 dolaro = 7.09 ŝilingoj

P = simpla vagonaro, **R** = rapidvagonaro

Gmünd (F. Jos. Bhn.)	P ŝ.	6.—	R ŝ.	9.—
Passau (Westbhn)	„	10.—	„	14.—
Salzburg „	„	10.60	„	14.60
Buchs „	„	23.40	„	31.40
Tarvisio (Südbhn)	„	14.20	„	22.20
Villach „	„	13.20	„	19.20
Spielfeld „	„	10.—	„	14.—
Nickelsdorf (Östbhn)	„	3.40	„	5.40
Marchegg „	„	2.20	„	3.20
Lundenburg (Nordbhn)	„	3.40	„	5.60

B) **Gravaj eŭropaj urboj:**

München, Germ. (Salzburg)
P ŝ 10.60 + Mk. 7.70 **R** ŝ 14.60 + Mk. 9.20

Berlin, Germ. (Passau)
P ŝ 10.— + Mk. 31.80 **R** ŝ 14.— + Mk. 33.—

Leipzig, Germ. (Passau)
P ŝ 10.— + Mk. 23.40 **R** ŝ 14.— + Mk. 25.—

Dresden, Germ. (Passau)
P ŝ 10.— + Mk. 26.30 **R** ŝ 14.— + Mk. 28.—

Praha, Ĉ. S. R. (Gmünd)
P ŝ 6.— + Kĉ. 50.— **R** ŝ 9.— + Kĉ. 56.—

Budapeŝt, Hung. (Nickelsdorf)
P ŝ 10.— **R** ŝ 20.—

Zagreb, S. H. S. (Spielfeld)
P ŝ 10.— + Din. 67.75 **R** ŝ 14.— + Din. 133.75

Antwerpen, Belg. (Passau, Ronheide)
P ŝ 10.— + Mk. 37.60 + bfr. 19.40
R ŝ 14.— + Mk. 39.10 + bfr. 19.40

Brüssel, Belg. (Passau, Ronheide)
P ŝ 10.— + Mk. 37.60 + bfr. 18.40
R ŝ 14.— + Mk. 39.10 + bfr. 18.40

Paris, Francio (Salzburg, Kehl)
P ŝ 10.60 + Mk. 28.40 + ffr. 66.80
R ŝ 14.60 + Mk. 29.90 + ffr. 66.80

Vizoj aŭ Vizomarkoj

por enveturo al Aŭstrio

Unufoja enveturpermeso!

germanaj ŝtatanoj:	10	orfrk.,	resp.	2	vizomark.	
ĉekoslovak. „	5	„	„	1	„	*)
hungaraj „	5	„	„	1	„	*)
italaj „	5	„	„	1	„	*)
rumanaj „	10	„	„	2	„	
polaj „	10	„				
francaj „	10	„				
belgaj „	10	„				
britaj „	8	sh.				
jugoslavaj „	50	din.				
letlandaj „	15	ŝ.				
nederlandaj „	6	hfl.				
svisaj „	8	sfr.				
U. S. S. R. „	20	ŝ.				

nur kun antaŭa envojaĝpermeso flanke de la Bundeskanzler Amt, Auswärtige Angelegenheiten: I., Ballhauspl.

U. S. A. ŝtatanoj: 10 $

Hotelprezoj: II a rangaj hoteloj ŝ 6.50 ĝis 8.—
III a „ „ ŝ 3.— „ 5.—

Manĝoj: matenmanĝo: ŝ —.50
tagmanĝo: ŝ 1.— (en komunkuirejoj) ŝ 1.50 ĝis 2.50 en modestaj restoracioj.
vespermanĝo: same.

Komuna loĝado: la kongreskomitato prizorgas komunajn loĝejojn proksime de la kongresejo.

*) Ĉe senrimedeco senpage! (manipulacielspezo).

Propono XII

Ĉar la sperto montris ke multe da SAT-anoj ne povas veturi al SAT-kongresoj, pro malbona ekonomia situacio, kaj tamen rajtas partopreni ĉiujn laborojn kaj decidojn, tial ni proponas ŝanĝi la nunan 28an artikolon de la statuto per la jena teksto:

"Ĉe la kongresbaloto, ĉiu delegito rajtas je tiom da voĉoj kiom da anoj li reprezentas; li devas nepre porti rajtigilon surhavanta la subskribon kaj la SAT-matrikulon de ĉiu delegintо."

L. Glodeau 50, R. Berano 741, Roux 835, Tomas 4286, Mora 4156, Béard 3648, Bisey 2743, Cachon 24, Fontaine 5225, Naray 376."

Propono XIII

La individuaj SAT-anoj de urbo aŭ vilaĝo kuniĝu kiel SAT-rondo, por komune vigligi la movadon en la koncerna loko.

SAT-anaro Leipzig.

Propono XIV

Nova punkto por la statutoj:

SAT-kongresoj kaj aliaj SAT-kunvenoj, en kiuj partoprenas SAT-anoj apartenantaj al diversaj socialistaj partioj havas la devon, redakti en nepre socialiste superpartia senco siajn deziresprimojn, rezoluciojn, flugfoliojn kaj aliajn publikaĵojn aŭ tekstojn direktitaj al diversnuancaj SAT-anoj. Ne devas en tiaj tekstoj unu sola socialista partio esti supermezure reliefigita kaj ne devas aperi en la teksto lokoj, kiuj povus ofendi la politikan sentonon de SAT-anoj. — La saman ŝintenon devas strikte[1]) observi SAT-funkciuloj aŭ unuopaj SAT-anoj, se ili direktas deziresprimojn, rezoluciojn, tekstojn aŭ publikaĵojn al diversnuancaj SAT-anoj. — Personoj, kontraŭagantaj tion estos severe admonitaj kaj en speciale ŝarĝa aŭ ripetita okazo eksigitaj el SAT.

Proponas: *SAT-ano n-o 962.*

Propono XV

La redaktoroj de l'asocia organo kaj de eventualaj aliaj organoj de la asocio (Senn. Revuo ktp.) zorgu por tio, ke ne estu publikigitaj artikoloj de Idistoj aŭ Idoemuloj, kiuj artikoloj detruas la harmonion, kreas nur konfuzon, malhelpante seriozan prosperan laboron, kaŭzante ĉe multaj fervoraj SAT-anoj seninteresiĝon, forreston el SAT — sen plua reaiĝo kaj estante tiamaniere la kaŭzo de forta membroperdo. La redaktoroj de l'asociaj organoj estu pro tio devigitaj kaj rajtigitaj *ne* represi tiajn artikolojn. Se la redaktoroj ne havas tempon por tio, oni donu al ili helpanton aŭ helpantojn, kiuj tion prizorgas.

Proponas: *SAT-ano n-o 962.*

La felietonon, alvokojn kaj div. jam kompostitajn raportojn ni devis prokrasti pro manko de loko.

Invito!

Karaj samcelanoj! Komune ni volas forgesi la teruran militon pasintan, kion ni povas ne pli bone fari ol per la ago en senco de la popola repacigo. Ni petas vin, venu al ni, al nia simpla tablo, estu niaj gastoj en nia hejmlando! Pasigu viajn feriojn venontajn ne en via hejmo, sed ĉe ni en servo de la popola repacigo. Kaj permesu al ni, pasigi nian libertempon, en aŭtuno aŭ venontan jaron ĉe vi! Per tia interkonatiĝo kaj interkomprenigo ni fine devas atingi la neeblecon de militoj en la estonteco kaj la triumfon de la homara kulturo. Laŭ la projekto neniu estos devigata resti en unu loko, sed oni povas ŝanĝi la restadejon, ekz. dum unu monato 2-, 3- aŭ 4-foje, tiamaniere samtempe akirante geografian scion. Bonvolu skribi al *Gust. Böhm, Chemnitz*, Postfach 625, (Germanio) de kiu vi ekscios pluajn detalojn.

[1]) rigore — *Red.*

Grava Sciigo

Dufoje ĉiumonate, — lastan ĵaŭdon antaŭ la dekkvina kaj lastan ĵaŭdon de monato je la 13^10^—13^55^ horo laŭ Mez-Eŭropa tempo okazos esperantaj radioparoladoj, transdonataj el Moskvo per la radiostacio je la nomo de Komintern (ondlongo 1450 metroj). La unua parolado okazas 9-an de julio.

Tiuj radioparoladoj estas aŭdeblaj per kristala detektora ricevilo radiuse 800 ĝis 1000 kilometroj kaj per malgranda (dutri katodlampoj) fortigilo-amplifikatoro — radiuse 2000—3000 kilometroj, kaj per plej granda fortigilo ankoraŭ pli vaste. Tiuj distancoj de aŭdebleco rilatas por anteno alta 15—20 metrojn.

Ĉiuj ge'amaradoj estas petataj traduki la supran sciigon nacilingven kaj nepre enpresi tiujn numerojn, kie ĝi aperos laŭ la adreso: Moskvo, Poŝtkesto 630, Sovetlanda Esperantista Unuiĝo. Por Esperanto-Radio-sekcio. Krom tio mi persiste petas ĉiujn gekamaradojn sendi laŭ la supremontrita adreso notojn, rimarkojn, anoncojn kaj eltranĉaĵojn el gazetoj kaj ĵurnaloj pri aŭdebleco de la radioparoladoj supre anoncitaj. Komunikante pri propraj observoj, oni ne forgesu komuniki ankaŭ per kiaj ricevaparatoj (alteco de anteno, kristala aŭ lampa ricevilo, kiom da lampoj k. t. p.) oni sukcesis aŭdi niajn esperantajn radioparoladojn.

Teknika administranto de Radiostacio je la nomo de Komintern
A. Kazakeviĉ (SAT 3967)

KORESPONDADO

TARIFO

Korespondado: Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. or., ĉiu plia linio la samon.

Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.

MALLONGIGOJ: L = *letero.* PK = *poŝtkarto.* PI = *poŝtkartoj ilustritaj.* PM = *poŝtmarkoj.* bfl = *poŝtmarko sur bildflanko.* k. ĉ. l. = *kun ĉiuj landoj.* esp.ajo = *esperantaĵo.*

Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

Bulgario

— K-do *Vasil Tabakov*, fabriko Kovaĉev, *Gabrovo*, dez. koresp. k. maŝintrikistoj de ĉ. l. Nepre resp. al ĉ. tiaj faklaboristoj.

Ĉekoslovakio

— K-do *Carlo Jirka*, trida ĉeskosl. legir, 37, *Ĉes. Budějovice*, pri ĉ. temoj (krome pri sporto) k. ĉ. l., L, PI.

— K-do *Robert Burghard*, Brand, n-o 109, *Tannwald*, pri ĉ. temoj, L, PK, PI. bfl. k. ĉ. l. Certe resp.

Francio

— K-do *Henri Veirman*, 52, rue de Tourcoing, *Mouvaux* (Nord) L, PK, k. ĉ. l.

Germanio

— K-do *Herbert Sonne*, Helenenstr. 3, *Limbach i. S.*, dez. raportojn pri div. temoj, (ŝakludanto tre agrabla).

— K-do *Georg Kraft*, Hallorenstr. 1, *Halle a. S.*, dez. inters. PI, PM, k. ĉ. l.

— K-do *August Maier*, Hagerstr. 306, *Erding i. Ob. Bay.* pri komunismo k. naturbelecoj, L, PK, bfl, k. ĉ. l. Certe resp.

— K-do *Herbert Hofmann* dez. koresp. kun gek-doj de l' tuta mondo, precipe kun Bulgario, Turkio kaj Sud-Rusio. Pritraktas ĉiujn temojn laŭ scipovo kaj interŝ. belajn koloritajn vidaĵ- k. artkartojn. Aliajn dezir-atajn ajojn mi sendos laŭ ebleco. Adr.: Schisslerstr. 15, I, *Augsburg*, Bavario.

— K-do *Willi Gross*, Plauenschestrasse 1 a, *Werdau i. S.*, dez. koresp. pri ĉiuj temoj. Certe resp.

Sovet-Unio

— K-do *D. Albanov, Arkadak* (Saratov. gub.) pri sociologio k. vivkondiĉoj en div. landoj precipe kun ekstereŭropaj, L, Pl.

— K-do *Voldemaro Curanov*, B. Tatarskaja ul. Sanitarnyj per, 5, *Minsk*, pri ĉ. t. k. ĉ. l.

— K-dino *Klara Volina*, Volodarskaja ul. 12, lĝ. 4, *Minsk*, L, PK, Pl, k. ĉ. l., resp. garantias.

— K-dino *Sarra Rozental*, Volodarskaja, ul. 9, lĝ. 2, *Minsk*, pri div. temoj, L, PK, k. ĉ. l.

— K-dino *Z. G. Fedorova*, Arbat, 8, kv. 11, *Moskvo*, pri div. temoj k. ĉ. l., precipe pri sporto, L, Pl. Nepre resp.

— K-dino *Polina Vitaŝova*, Balabolina ul. 6, *Serdobsk*, Sarat. gub. pri aktualaĵoj kaj viv-kutimoj.

— K-do *Novokreŝĉenov Aleksandro*, Ĵeleznodorojnaja 51, *Serdobsk*, (Sarat. gub.) pri instruistaj k. laboristaj temoj.

— K-do *Naum Joĥin*, Graĵdanskaja 19, kv. 22, *Leningrad*, dez. koresp. pri socia k. lab. vivo k. ĉ. l., nepre resp.

— K-do *Karmolitov, V. K.*, Hospitalnaja ul. 31 kv. 14, *Minsk*, interŝanĝas PK, Pl, PM, k. ĉ. l. Sendu unue.

— K-dino *Valentinoviĉ, M., Veliĵ*, Pskovsk. gub., pri sporto, medicino, interŝ. Pl, PM.

PENSU PRI LA VARBADO!

RECENZEJO

Libroj.

La lasta kravato de Aleksy (Stanisl. Balinski), Biblioteko de Pola Esperantisto, I., 24 pĝ., prezo 50 gr.

Terura aventuro, en kiu ludas ĉefrolojn rusa elmigrintino kaj rusa bolŝevika sendito, kiu (kompreneble) enamiĝas en la virinon. Ŝia mistera morto, la sangmakulita kravato de A., lia arestiĝo kaj aliaj dramecaj epizodoj skuas la leganton. Iun literaturan valoron la rakonto ne havas. — Kial la tradukinto ne esperantigis la vortojn "spleen" (spleno) kaj "comptoir" (kontoro)? "Ĝis al" (pĝ. 17) estas gramatika eraro.

Quedlinburg proksime al Harz. Gvidfolio 6-paĝa, ilustrita, eldonita de Urba Trafik-Oficejo.

Gazetoj

Represis el S-ulo: *Ruhr-Echo*, Essen, 23. 6., Let. el Sofio (S. 37), *Vestsvenska Kuriren*, Göteborg, Strikb. el Ĉekosl. (S. 35), Alvoko de brit. lab. gvid. (S. 31), *F. D. Politiken*, Göteborg, la sama.

Enpresis div. artikolojn: *Daily Herald*, London, 23. 6., 29. 6., 1. 7., anguloj en esp. kaj angla trad., *Sovetskaja Bjelorusi*, Minsk, 24. 5., pri SAT. *Social-Demokraten*, Stockholm, 3. 7., longa art. pri radio kaj esp., kun kliŝoj de esp. gazetoj, *Munkaskultura*, Budapest, regule presigas esp. angulon kun sciigoj de HLES, *L' Humanité*, Lyon, 2. 7., Esp. en la servo de proletaro, *Esp. Hejme*, Kazan, enpresas multajn art. por subteno de SAT kaj ĝiaj organoj.

KONGRESPARTOPRENONTOJ, NE FORGESU VIAN MEMBROKARTON!

Presejo: UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT, LEIPZIG